BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



# Sonorilo

56a jaro n° 3
Majo - Junio 1964

# Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

**redakcio :** jaumotte maurice
roose fernand, sint-klaradreef 59, brugge tel. (050) 319.81
maertens grégoire
poupeye charles

**kunlaborantoj al regulaj rubrikoj :**
dr. pol denoël
durwael ivo
iserentant roger
de cuyper georges
de marré luc

**administrado :** terryn j. raapstraat, 72 gent

## Belga Esperanto-federacio

**asocio sen profita celo**

**sidejo & prezidantejo**
debruynlaan 44, wilrijk tel. (03) 377758

**honora prezidanto**
kempeneers paul

**honora vicprezidanto**
sielens henri

**ĝenerala prezidanto**
jaumotte maurice

**prezidantoj**
debrouwere gerard, magdalenastraat 29 kortrijk
dro denoël pol, 10 rue v. raskin liège

**unua vicprezidanto**
roose fernand

**vicprezidantino fakestrino por kongresoj**
plyson j. 23, placo e. flagey, bruselo 5 p.k. 236804

**vicprezidanto fakestro pri teknikaj rimedoj**
verstraeten jules, sint bernardse steenweg 1078 hoboken

**ĝenerala sekretario**
de marré luc, groenendaallaan 232, antwerpen tel. (03) 411912

**sekretario por la nederlandlingva regiono**
maertens grégoire, prins leopoldstr 51, st-kruis tel. (050) 34935

**sekretario por la franclingva regiono**
de cuyper georges, 66, rue de dorlodot, monceau sur sambre

**kasistino** terryn juliette, raapstraat 72, gent

**poŝtkonto de B.E.F. : 1634.34 raapstraat, 72, gent**

**ĉefdelegito de universala esperanto-asocio**
fr. schellekens, frans hensstraat, 44, antwerpen 2
p.k. 9051.25


# Nia prezidanto 65 jaraĝa



La 5-an de aprilo 1899 en domo de Van Aerdtstraat, 6, Antverpeno, naskiĝis ĝenerala Prezidanto de BEF kaj Prezidanto de la Antverpena Esperanto-grupo " La Verda Stelo " kaj de la Antverpena Esperanto-Komitato Intergrupa (EKI). Samideano Jaumotte do iĝis 65-jara. Du tagojn antaù la oficiala naskiĝdato, La Verda Stelo dum sia semajna kunveno festis kaj honorigis lin en intima sfero. Belaj donacoj estis transdonataj de la grupo kaj de EKI. Sinjorino Jaumotte ricevis mirindajn florojn.

La salono estis plenplena de fidelaj gemembroj kiuj ŝatis ĉeesti tiun feston : multaj fidelaj kaj malnovaj geamikoj de li troviĝis inter la ĉeestintoj kaj tiamaniere speciale plezurigis kaj surprizigis Sinjoron Jaumote. De eksterlande kaj enlando envenis gratulleteroj kaj telegramoj.


Kortuŝite sed sprite kaj vivoplene Sinjoro Jaumotte dankis.

Ankaù la redakcio gratulas nian ĝen. Prezidanton kaj edzinon speciale pro lia aktiveco nelaciĝinta, kaj ni publikigas poemeton honore al li verkitan de Tyneverum.

Mi konas cin, amiko, jam de l'studentaj jaroj,
Al ci ne pensis kiel al posta prezidanto :
Urtikaj la tiamaj jun-jurnalistaj faroj
Respondis pli al rol' de metia... protestanto.
Iĝante viro, kiu la homojn funde konas,
Ci tiam estis « laŭtparolil' » de l'« Verda Stelo » :
En nuna tempo daŭre ĝi sampenetre sonas !

Jen, ci la torĉon de l'pioniro Schoofs, laŭ celo
Al ci de li montrita, plenverve pluen portis :
Unika la kongreso de l'ŝvita « senegala » ;
Movado belga sub la impuls' de ci risortis,
Ondadis el spliteco al kuna « duĉevala »,
Trenpreta ĝuste klam la « politika » baŭmas...
Tutkore mi gratulas cin, verdan diplomaton,
En cia sesdekkvina, sagacan pacsoldaton !

TYNEVERUM



# BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

## 46-a KONGRESO EN LIEĜO (WÉGIMONT)

16-, 17- kaj 18-a de majo 1964

Adreso por korespondado :
D-ro P. Denoël, 20 rue Victor Raskin, Lieĝo.

## HONORA KOMITATO

Sinjoro Pierre **Clerdant**, Provincestro.
Monsinjoro **Van Zuylen**, Episkopo de Lieĝo
Sinjoro Georges **Remy**, Prezidanto de la Provinca Konsilantaro
Sinjoro Maurice **Destenay**, Urbestro de Lieĝo
Sinjoro Ernest **Natalis**, Profesoro pri Pedagogio en la Lieĝa Universitato
Sinjoro Jeanfils, urbestro de Soumagne-Wégimont

## PROGRAMO

### SABATON, LA 16-AN DE MAJO

13.00 h. Oficiala malfermo de la **Akceptejo** en Kastelo de Wégimont. Malfermo de speciala Poŝtoficejo.
15.00 h. En Wégimont, malfermo de la Propagandejo.
En Lieĝo, **Kunsido de la Administrantaro** de B.E.F.
Akcepto de delegacio en la Lieĝa Urbodomo.
17.00 h. Fermo de la Poŝtoficejo.
20.00 h. **Festvespero** : Filmoj ("Urbo Lieĝo" — "Jubilea Beneluksa Kongresco" — "Liège-Sofia-Liège").
Skeĉoj — Muziko — Kantoj.
Senpaga Loterio — Balo.



### DIMANĈON, LA 17-AN DE MAJO

10.00 h. **Solena Ceremonio okaze de la 60-jara JUBILEO de la Lieĝa Grupo Esperantista**
La Espero.
Salutparoloj de Oficialuloj
" de fremdaj Gastoj
" de alilandaj Gastoj
" de B.E.F. grupoj
Honorigo al Pioniroj
Transdono de la Premio A. Jennen
Muziko
Festparolado.
12.00 h. **Honorvino** (fare de la Provincaj instancoj)
Komuna fotografado.
13.00 h. Remalfermo de la Poŝtoficejo
14.00 h. Gvidataj vizitoj : Tra la parko de la Bieno
Tra la Herva Altebenaĵo
En la arta Preĝejo de Soumagne.
17.00 h. **Katolika Diservo** en la biena Kapelo.
Definitiva fermo de la Poŝtoficejo
18.00 h. **Ĝenerala Kunsido de Belga Esperanto-Federacio**
Ĝenerala Kunsido de Belga Esperantista Junulara Asocio
19.30 h. **Bankedo**
21.00 h. **Kongresa Balo**

### LUNDON, LA 18-AN DE MAJO

9.00 h. Tuttaga ekskurso tra la Ambleva Valo. Forveturo el Wégimont per aŭtoĉaroj.
12.00 h. Komuna manĝo en Trois-Ponts.
Poste : Akcepto kaj vizito de la Akvofarejo en Chevront, Akcepto (malvarma manĝo) kaj vizito de la Grotoj en Remouchamps. Reveno al Lieĝo, kun halto ĉe la ĉefstacidomo de Lieĝo.



RABATO POR ESPERANTISTOJ

## BELGA ESPERANTISTA JUNULARA ASOCIO

Kvankom BEJA fondiĝis la 28-an de okt. 1962 je iniciato de S-ro Wim De Smet, oni povas diri ke ĝi nur praktike funkciis en 1963. Nia laboro estis grandparte organiza : statutoj, rilatoj kun BEF, kompilo de membrolistoj, fiksado de respondecoj de ĉiu estrarano k.t.p. Tio tamen ne estis ĉio ! !

— BEJA dissendis al la membroj kaj "interesuloj" en 1963,7 bultenojn (la 2 unuaj estis trilingvaj).
— En decembro aperis nia unua nacilingva monata informilo, destinata al esperantistoj kaj al ne-esperantistoj.
— Dum la Jubilea Beneluksa Kongreso en Antwerpen okazis unua aparta kunveno de kelkaj BEJA-anoj.
— Dum la sabata vespero de tiu-ĉi kongreso JAS (Junulara Antverpena Sekcio) prizorgis amuzan parton de la programo.
— Dum semajnfino de la 12-a kaj 13-a de oktobro okazis piedekskurso ekde Bruselo.
— La JAS daure kunvenis.
— Kelkaj gejunuloj nuntempe preparas agadon en la Universitato de Liège.
— 4 BEJA-anoj kune vojaĝis al la 7-a Internacia Seminario en München, kaj revenis plenaj de entuziasmo.
— Kontaktoj daŭris kun la B.V.S.E. (Beweging voor de Verenigde Staten van Europa) kaj la V.J.H. (Vlaamse Jeugdherbergcentrale) kiuj nun propagansas Esperanton.
— Krom la tre grava helpo de BEF, apogas nian asocion IFEF, SEL kaj kelkaj SAT-anoj.
Nia agado en 1964 estos trispeca.

1) **Pli vasta informado :**

Niaj nacilingvaj informiloj estas destinataj precipe al ne-esperantistoj. Ili nur povas efiki se ili estos dissendataj en granda kvanto.

a) Vi povas igi viajn junajn konatulojn simpatiantoj je 10 F. La koncernaj persoroj ricevos dum la tuta jaro ĉiumonate informojn pri la Esp.-movado en Belgio kaj en la mondo. Adresojn sendu al la ĝen. Sekr., Roger Van Humbeeck — Dambruggestr, 296 — Antwerpen. Monon devas alveni ĉe la kasistino Ingrid Maes — Lange Elzenstr, 38 — Antwerpen (PĈK 15.06.57).

Atentu : simpatiantoj **ne** estas membroj de BEJA. Ni konsideru tion kiel unua paŝo al membriĝo. Sekve iamaj membroj ne rajtas iĝi simpatiantoj.



b) Ni cetere ŝatus sendi niajn informilojn senpage al multaj gejunululoj kiuj montras interesiĝon. Tio povos okazi se kelkaj homoj bonkoraj ĝiros sumon al nia kasistino (menciante "por la simpatiantoj). Sinceran dankon de antaŭe.

2) **Pliprofundiĝo de Esperanto-kono :**
5 knaboj 16 kaj 17-jaraĝaj decidis komenci korespondadon kun 5 aliaj BEJA-anoj samaĝaj, kiujn ili ankoraŭ ne konas. Ili invitos siajn korespondantojn kune viziti la Belgan Kongreson en Liège aŭ la TEJO-n kongreson en Amsterdom.
Kiu ŝatas kunagi ? Petu ankaŭ vi adreson ĉe nia ĝenerala sekretario menciante deziratan aĝon, sekson, loĝlokon....

3) **Membriĝo :**
La grupaj kasistoj daŭre akceptas la kotizojn kaj sendos ilin al F-ino Terryn, kiel antaŭ la ekzisto de BEJA.
Bonvolu tamen aténti ke la BEF-estraro okaze de sia administrantara kunsido de la 6-a de oktobro konsentis kun ŝanĝoj de la limjaroj :

Kadeto — ĝis 16-jara
Junulo — ĝis 25-jara

Pliaĝuloj (krom estraranoj) ne povas esti membroj de BEJA. Nia ĝenerala sekretario nepre bezonas la liston de ĉiuj membroj malpli ol 26-jaraj (se eblas kun naskiĝdato).

— Kiu povas informi nin pri WAY (World Association of Youths kun sidejo en Bruselo) ?

IVO DURWAEL

### KONTAKTO ? KIO ĜI ESTAS ?

— Ĉu vi ankoraŭ demandas ? Ĉu vi ne scias pri la nova junulara revuo, kies unua regula printempa numero jam atingis ĉiujn partojn de la mondo ?
— Ne. Pri kio ĝi skribas ?
— Pri ĉio kio interesas nuntempan junul(in)on. Jen pri sociaj problemoj, jen pri kulturo, jen pri vojaĝoj, jen pri sporto...
— Interese. Sed kie ĝi trovas kunlaborantojn por ĉiuj ĉi temoj ?
— Ĝiaj kunlaborantoj troviĝas en diversaj landoj de la mondo. Eĉ vi mem povas esti inter ili. Jes, nur sendu vian ideon, proponon, artikolon, foton, tradukon de interesaĵo aŭ ion similan al la redaktoro Humphrey Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge 38, Mass., USA.
— Bonege ! Kiamaniere mi povas ricevi la revuon ? Kie aboni ĝin ?
— Ĉu vi ne scias ke vi povas ĝin ricevi eĉ senpage ?
— ? !
— Jes, ne miru. Se vi estas individua membro de UEA (J-MA) kaj ne atingis la 22-an jaron, vi ricevos ĝin sen ia ajn faro. Se vi jam transpasis tiun aĝon sed ne atingis ankoraŭ la 25-an, vi simple deklaru tion al la Centra Oficejo de UEA kaj vi ankaŭ senpage ricevos la revuon.
— Perfekte ! Mi diros tion al miaj samklasanoj kun kiuj mi lernas Esperanton en lernejo.
— Momenton. Ne forgesu memorigi ilin ke la kursanoj de oficialaj lernejaj kursoj ĝuas specialan rabaton (kompreneble, se ili ne jam estas membroj de UEA). Por ili la jarabono kostas nur 2,5 guldenojn, se ili sendas samtempe minimume 10 abonojn kun oficiala lerneja atestilo.
— Kaj tiuj kiuj estas nek individuaj membroj de UEA malpli ol 22-jaraj nek lernejaj kursanoj ?
— Por ili la abono kostas 8 guldenojn jare aŭ 32 stelojn.
— Dankon pro la informoj.

El Esperanto - nr. 701 (4)

# 20-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE T.E.J.O., 8-15 augusto 1964

**ANNE FRANK DOMO, AMSTERDAM**
**sekr. : Kastelenstraat 231, Amsterdam Z.**
**kas. : Vermeerstraat 7, Zaandam, ĝiro : 686965.**

Ni anoncas la temojn de la

**ORATORA KONKURSO :**

1. TEJO dudekkvinjara.
2. La Taglibro de Anne Frank, kiel ĝi al mi impresis.
3. Milito, ĉu solvilo por internaciaj problemoj ?
4. Ĉu eniru la lernejojn nova instrutemo : « La Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj » ?
5. Kion mi **ne** ŝatas pri Nederlando.

**PRELEGOJ :**

— **« Milito, ĉu solvilo por internaciaj problemoj ? »** de mag. G.H. Slotemaker de Bruine, parlementano, prezidanto de la Pacifista Socialista Partio de Nederlando, ĉefestrarano de la Unuiĝo de Mondfederalistoj ; kaj :

— simpozieto pri Afriko, konsistanta el prelego, diskuto, ekspozicio aranĝataj de la « Centro de Espolroj pri Afriko » de Pola Esp. Junularo.

kaj prelego : **« La grupo de junaj Nederlandanoj dum la unua jaro 1963-1964 de sia helpkampanjo en Kamerun »**, de inĝ. W.H. Dijkstra, ĉefestrarano de la Nederlanda Kristana Unuiĝo de Kamparaj Gejunuloj.

**Ambaŭ Nederlandaj prelegontoj lernas Esperanton speciale por siaj prelegoj, malgraŭ densa profesia okupiĝo !**

Ni memorigas :

La kotizoj estas nun : 85 ned.gld. por ĝis-20-jaruloj,
90 ned.gld. por pli-aĝuloj.

Krompago por ne-TEJO-membroj : 5,— ned.gld.

**Atentu : la aĝlimo por partopreno estas 25 jaroj.**

Ĉiu kongresano kunportu : littukojn, bankostumon, muzikilojn.

Statistiko je 15 marto 1964 : 80 aliĝintoj el 14 landoj.

**El la programo :**

Dimanĉe : oficiala inaŭguro, gvidataj vizitoj al la domo, kaj vespere speciala prezento de la profesia Internacia Arta Teatro.

Lunde : akcepto de la magistrato de Amsterdam, rondveturado en salonboatoj, el kiuj vi povos admiri la vespere lumigitajn fasadojn.

Krome estos vizitoj al la Amstel-bierfarejo, al la vilaĝo « Broek », kie oni aranĝis tutan oficialan festosemajnon dum la kongreso kaj al la kultura centro, la kastelo de MUIDEN.

Ekskurso okazos al la arbarriĉa regiono « Het Gooi ». En Hilversum oni vizitos la urbdomon kaj la AVRO-radio-ejon.


**Gevaert** organizis grandiozan foto-konkurson pri temo Anne Frank (ekstra junulara premio por gejunuloj ĝis 25-jaraj de 200,— gld kaj medalo !)

# NIA KARAVANO AL LA 48-a KONGRESO

**Sub tiu titolo ni publikigis raporton pri nia vojaĝo al Orienta Eŭropo kaj al la kongreso. Tie ni parolis pri antikva Turka fortikaĵo en la urbo Tirnovo. Ni faris tion laŭ lie ricevita informo. Dr. B. Nedkov el Sofio atentigas nin pri la fakto ke tiu fortikaĵo estas malnova BULGARA konstruaĵo el la Mezepoko kie regis dum ĉirkaŭ 300 jaroj Bulgaraj reĝoj. La Turkoj konkeris ĝin en la 14a jarcento. Koran dankon al Dr. Nedkov pro tiu ĝustigo.**

La Redakcio.





# RECENZOJ

**G.E. MAURA « Duonvoĉe ». Poemaro eldonita de Stafeto (Kanariaj Insuloj) sub numero 19 en la serio de la Beletraj Kajeroj. 1963. 180 paĝ. Prezo : 1,50 Us.Dol. Eldonnombro : 1.000.**

Kiam oni nomas iun poeton talenta, multaj konkludas el tio ke absolute ĉiu de liaj poemoj devas esti majstroverbo. Estas ne tiel. Kelkaj granduloj iĝis, prave, mondfamaj nur pro kelkaj poemoj. Bona ekzemplo estas la Bruĝa pastro-poeto Guido Gezelle. (Amiko Vermuyten sukcese tradukis kelkajn). Mi konsideras G.E. Maura, tiun al Panamo elmigrintan Hispanon, vere granda poeto. Kaj se ne ĉiuj aparte en tiu ĉi kolekto estas belegaj, ili estas almenaŭ veraj poemoj. Mi opinias la Franclingvan la plej bela ! Pri la Hispanlingva mi ne povas juĝi. Tiu Franclingva ŝajnas prenita rekte el la verkaro de Ch. Baudelaire. Sama spirito. Cetere, tiu evidente riĉe kulturita samideano profunde sentas la influon de Ch. Baudelaire (legu ekzemple sur paĝo 34 la poemon « Sur la plaĝo »)... kaj de Quintus Horatius Flaccus.

Kvankam tute ne malpeza de animstato, enestas tamen porcio da « satiraj mildaĵoj ». Tie mi tre ĝuis la « plenmano(n) da pingloj », kies unua pinglo incitetas Grenkamp-Kornfeld, kaj la aliaj laŭvice R. Schwartz, A. Cseh, W. Auld, G. Waringhien k.a. Por kompreni ĉiujn oni devas esti klera pri la esperanto-literaturo. Mi demandas al mi ĉu la aŭtoro konas persone la tradukanton R. Bernard (fine de paĝo 111). La poemo « Jesaja 53 » (p. 81-82) pruvas ke la murdado de Judoj forte impresis lin... kaj la poemo forte impresis nin. La poemo « 1935 » (sur p. 42-43) estas ia inventario de 3 jaroj da amovivo kun la edzino, dum ke la poemo 1936 sur p. 42-43 parolas pri la disiro kaj la verŝajne venonta amovivo de la karulino (!). Mi ree diru — kiel en kelkaj antaŭaj recenzoj — ke foje la elizio ŝokas mian senton, kiel ekzemple fine de paĝo 149. Mi ne vidas la pravigon de elizio tie. Generale mi plej ŝatas la parton « Skarpo Tempokolora » ; ĝi estas, laŭ mia gusto, la plej poezia. La tuto ne estas facila legaĵo. « Duonvoĉe » estis unuafoje eldonita en 1939. Mi supozas ke tiu-ĉi estas la kompletigita eldono.

Konklude : bela poemlibro, kiu vere pliriĉigas nian literaturon. Se ni volus priparoli la moralan flankon de la poemaro, ni devus tiel nuancigi kaj skribi tiel multajn konsiderojn, ke por tio vere ne estas loko disponebla. Cetere ni ŝatus legi ie apartajn studartikolojn pri tio. Ni ne kaŝu por ni mem ke ĝi estas problemo en nia literaturo, kiel ankaŭ alie.

SONO.

**Aperis fine la « Aŭtuno - '61 » numero de « La Suda Stelo ».** Tiu revuo, en la nuna formo, mortis. Sed reaperos alia, kiu anstataŭos samtempe la « Jugoslavia esperantisto ». Tiu aperos sesfoje jare, kun amplekso de 16 paĝoj, tre diversa de enhavo kaj kostos 30 stelojn aŭ 7,50 Ned. Guld. Mendi laŭ adreso : Terazije 42 BEOGRAD, Jugo-Slavujo.

Tiu-ĉi numero estas tre bela kaj tre interesa. La ilustraĵoj estas bonege elektitaj, el ĉiuj epokoj la plej reprezentaj. Estas ankaŭ intervjuo kun P. Thorsen; recenzoj, leterojç de samideanoj kaj tre diversaj literaturaĵoj. Inter la artikoloj mi citas: « Morala esenco de socialisma familio ». Kompreneble estas ankaŭ multaj poemoj. Bela revuo !

**Prof. Dr. Edmond Privat (†): « Aventuroj de Pioniro ». Eldonis « Stafeto » en la serio de la Beletraj Kajeroj, kiel nr. 17 en la jaro 1963. 162 paĝoj. Prezo : 1.80 Us.Dol.**

La eldonisto J. Regulo presigis de tiu volumo la duoblan nombron de la kutima eldonnombro de la libroj de tiu serio. Li ne malpravas. Tiu libreto estas juveleto. Mi antaŭvidas ke ĝi estos rapide elĉerpita. Ĝi povis ankaŭ havi kiel titolon « La Memoroj de Privat » ; ĉar efektive temas pri tio. Privat, brila intelektulo, havis brilan karieron. Ankoraŭ juna studento, li jam lernis nian lingvon kaj fariĝis tuj ĝia inteligenta, racia propagandisto. Kiel tre aktiva ĵurnalisto, li havis interesajn kontaktojn, kun plejaltranguloj. Ĉiufoje li antaŭmetis antaŭ ili la problemon de la mondlingvo kaj esperanton. Ni ĉiuj konas la klopodegojn kaj sukcesojn pro inteligenta kaj diplomatia agado de Dr. Lapenna. Multaj inter ni ne (plu)konas tiujn ne malpli interesajn de Dr. Privat. Pri ĉiuj tiuj estas rakontite en tiu-ĉi libro. Pri la Usona filozofo W. James kiu komparis la multlingvecon al diversaj muzikskriboj ; pri la Usona prezidanto Th. Roosevelt kiu spertis lingvajn malfacilaĵojn ktp. Eĉ ĝis la Itala reĝo en la Quirinale la aŭtoro povis penetri. Li rakontas pri la prelegaro en Nord-Ameriko, kiu fariĝis preskaŭ krozado por nia lingvo. Ĉu vi scias ke en la unua renkontiĝo internacia por la enordigo de la radio-ondoj okazis preskaŭ tute en esperanto ? Ĉu vi scias kion Dr. Privat atingis en la sino de la Ligo de nacioj ? Ni miras ke jam en tiu tempo tiom da eminentuloj favoris esperanton. Tiel ke ni demadas al ni mem kial esperanto ne faris pli da progreso. Estas kvazaŭ ĉiuj atendis la tempon en kiu esperanto iĝos nepra necesaĵo. La libro estas interesa plie pro multegaj rimarkoj kaj observoj rilate al la ĵurnalismaj informadoj (p. 35) al la seriozeco de la diplomatoj (p. 75-76) al la relativeco en la politiko ; pri lecionoj kiujn donas la historio ; de kio dependas ĉu oni estas heroo aŭ perfidulo (Pilsudski !). Ĉion tion cetere la aŭtoro pli detale klarigis en aparta libro « Interpopola Konduto ». Legante paĝon 71, Flandroj ne povos ne pensi pri juĝeĉaj kaj armeaj situacioj kiuj ekzistis en Belgujo en la pasinta jarcento kaj dum la unua mondmilito. Feliĉe for ! Unu de la libroj kiujn mi plej varme rekomendas.

Drs. F. ROOSE

**« RIPOZOJ » eldonita en Sofia, Bulgarujo, Tolbukhin 51. Grandformata, riĉe ilustrita. 30 paĝoj.**

Atingis nin la dua numero de tiu ankaŭ en aliaj lingvoj eldonata dumonata revuo. Ĝi ne estas alia « Nuntempa Bulgario » kiu reliefigas la multajn aspektojn de l' hodiaŭaj vivo kaj laboro en tiu lando ; sed ĝi speciale atentigas pri la vizitindaj feri-lokoj, banurboj, muzeoj, kulturaj manifestacioj ktp ktp. La du numeroj estas belaj, kelkpaĝe eĉ belegaj ; kaj la akompanantaj artikoloj estas interesaj. La enhavo estas tre varia. Tial la abonprezo de 1,50 Us.Dol. estas tute ne alta. La eldonantoj demandas kritikon kaj sugestojn de la legantoj. Ilia fido en la Esperanto-lingvo kiel disvastigilo de la Bulgaraj kulturo kaj lando ne estu seniluziigata.

SONO



**P.E. Schwerin : « Gaja Leganto per Esperanto ». Eldonis The Esperanto Publishing Company en Londono. 2a eldono. 47 paĝoj. Prezo 2 Ŝiling.**

Ke tiu-ĉi verketo de nia Aŭstralia samideano konas duan eldonon pruvas ĝiajn taŭgecon kaj sukceson. La duono estas plena per spritaĵoj. Plue oni trovas vortludojn, preserarojn, matematikaĵojn, societludojn, anekdotojn kaj ankaŭ konsilojn por grupestroj. La spritaĵoj ne estas ĉiam de la plej komikaj. Sed interesa estas la fakto ke li donas kelkajn modelojn de demandoj — respondoj kiujn oni povas fari en la grupkunveno post legado de spritaĵo. Mi tamen estus preferinta nur anekdotojn kiuj ja estas same, se ne pli, komikaj kaj certe multe pli interesaj. Ĉiukaze ĝi estas plej konvena libreto por perfektiĝi en la esperanto-praktikado post elementa kurso kaj por plenigi per iu programo la grupkunvenojn.

SONO

**Ĉinaj Eldonaĵoj**

La Fremdlingva eldonejo en Pekingo eldonis en la lasta tempo tre multajn politikajn broŝurojn, ankaŭ en Esperanto. Tio montras ke la gvidantoj scias la valoron de esperanto. Inter ili estas certe ne malmultaj kiuj povas interesi nin. Mi citas nur kelkajn : La Origino kaj disvolviĝo della malakordoj inter la gvidantoj de la Rusa Komunista Partio kaj Ni » — « Ĉu Jugoslavio estas socialisma lando ? » — « Propono pri la ĝenerala linio de la internacia komunisma movado » — « Komentario pri la deklaro de la komunista partio de Usono » — « La vero kiel la gvidantoj de la Kom. partio de Sovjet-Unio alianciĝis kun Hindio kontraŭ Ĉinio » « La problemo Stalin » ktp. Tiuj broŝuroj estas ĉiuj tre malmultekostaj.

Ni ricevis ankaŭ belegan albumon pri moderna Pekingo. Sed ĝi donas multloke ankaŭ bildojn pri malmoderna Pekingo, tiel ke ni povas kompari. Laste, ni menciu ankaŭ la ampleksan novelaron de la Ĉina aŭtoro LUSIN (1881-1936) kiu ŝajne estas klasikaĵo kaj pri kiu ni esperas aperigi recenzon en venonta numero.

**« Elementaire Esperanto-Cursus » uitgegeven door de « Arnhemse Koerier ». — 63 paĝoj. Prezo : 3,50 Ned.G.**

Estas kurso en 21 lecionoj, laŭ tekstoj kiuj aperis en supre nomita gazeto. Tiu gazeto estas senpaga, reklama eldono kiun oni disdonas en ĉiuj domoj de Arnhem kaj de keldaj apudaj vilaĝoj. La propaganda valoro do estis certe grandega. Nun ĝi aperis libroformate. La aspekto estas plaĉa. Mi opinias la prezon iom tro alta. Bona afero estas la multaj ekzercoj ; malbona afero ke en keldaj lecionoj oni donas ne sufiĉe da materialo. Tio faras ke tiu kurso ne estas kompleta. Mankas ekz. la afiksoj ind, ema, end, nj, ĉj. Kelkaj lecionoj konsistas el ripetadoj kaj unu el ĉefaj faktoj pri lingvo kaj movado. La malfacilega uzo de « sia » ne estas klarigata. La aŭtoro(j) ankaŭ ne rimarkis la paradokson inter -n de direkto (pao 17) kaj la manko de -n post « al » (p. 18). Sed mi kredas ke ĝi estas lernolibro kiu estis kun plezuro uzata.

SONO


Eldonejo-librejo
SONORILO

Kerkstraat 61
Brugge
P.C. Nr 1521.40


1. **La eldonanto de la politikaj broŝuroj en Esperanto (vidu la anoncon en n° 4 de 1963 de nia gazeto, sub letero D) estas la Fremdlingva Eldonejo en Ĉinujo. La Ĉina Esperanto Ligo nur perantas.**
2. **Kelkaj ekzempleroj de la belega eldono « Svisa Esperanto kalendaro » estas ankoraŭ disponeblaj. Ĝi estas envilnda donaco por via eksterlanda korespondanto. Prezo 60 F (vidu detalojn en la n° 4 de Sonorilo 1963 sub litero A).**

# GRUPA VIVADO

**ANTVERPENO**
**ESPERANTO-GRUPO**
**« LA VERDA STELO »**
**Kunsidoj : Ĉiuvendrede en « Witte Leeuw », Frankrijklei, 4 je la 20,15a h. Poŝteknumero : 726.54.**

**65-JARA DATREVENO**

**Nia Prezidanto S-ro Maurice Jaumotte festis sian 65-jaran datrevenon de sia naskiĝo antaŭ kelkaj semajnoj. Kun fideleco kaj sincereco ni gratulas nian Prezidanton plej kore kaj deziras al la « eterna junulo » ankoraŭ longan vivon kaj daŭran aktivecon en Esperantujo ! ! ! Ke lia sano restu kiel ĝi nun estas kaj ke lia historia « bonhumuro » ankoraŭ ĉiam heligu lian vivovojon kaj liajn aktivecojn ! Ni kompreneble emfazas en niaj gratuloj la fidelan ĉiam helpopretan edzinon, S-inon Marg. Jaumotte, la gefilojn Roger kaj Felicie kaj la promesplenan nepineton Viviane, same kiel la aliajn familianojn.**

---

La 7an de februaro S-roj L. De Marré kaj R. Van Eynde paroladis pri « Alfred Nobel ». La unua paroladisto grandlinie skizis la vivon de tiu famkonata homo al kiu oni dankas la « Nobelpremiojn », dum la dua paroladisto plej grandparte montris 2 trafajn filmojn pri tiu nobla figuro.

La 14an dum la kultura distra vespero S-ro H. De Roover paroladis, je la granda amuzo de la publiko, pri la diversspecaj ban-manieroj inter la diversaj popoloj tra la jarcentoj. Abunda materialo ilustris lian paroladon. Aliflanke S-ro R. Jaumotte donis al la ĉeestantoj per bildoj kaj vortoj superrigardon super la estonta ekspozicio de Novjorko. Kompare al tio li prezentis filmojn pri nia iama « Expo 58 ».

Dum la vespero de la 21a diversaj gemembroj kunlaboris al la sukceso de la programo « Flandraj Arttrezoroj » : F-ino Bl. Geers, S-roj M. Jaumotte, Fr. Schellekens, Jozef Montmirail kaj J. Verstraeten. Unu pentraĵo estis priparolata : « La Plorado pri Kristo » de Quinten Matsys kaj unu bronza skulptaĵo « La Geredoj » de Henri Moore troviĝanta en la plenaera muzeo « Middelheim » de Antverpeno.

La 28an S-ro R. Van Eynde denove prezentis kaj zorge elektis la dokumentan filmvesperon. Inter la tri prezentitaj ekzempleroj estis unu parolata en Esperanto : « La Usona Terkulturisto ». La tutaĵo estis produkto de la tehnika grupa sekcio, do, garantio por la bona kvalito.

La 6an de marto malnova kaj fidela membro S-ro A. Faes paroladis pri W.A. Mozart. Li aŭdigis muzikon pri tiu mir-homo kaj ĝin daŭre kaj konstante komentis per larĝaj gestoj kaj mieno « kvazaŭ en ekstazo ». La publiko videble subiris lian entuziasmon kaj la Prez. S-ro M. Jaumotte dankis kore kaj sincere dum la ĉeestantoj longe aplaŭdis la paroladiston. Estas mirinde ĉio kion oni povas malkovri en muzika teksto ! !

La 13an S-roj R. Rijckaert kaj R. Van Eynde parolis pri « La Najtingala parko de Antverpeno » ; la unua montrante abundajn kaj belajn diapozitivojn, la dua per lerta kaj trafa enkonduko kaj flua komentario dum la prezentado. Por kompletigi la vesperon S-ro Rijckaert ankoraŭ montris diapozitivojn pri persona vojaĝo en la Nigra Arbaro kaj kiun S-ro Van Eynde same lerte komentariis. Bela vespero !

La 20an, la specialisto en tiu stilo, S-ro Fr. Schellekens en ĉiuj detaloj, per vortoj kaj belaj diapozitivoj, priparolis la mondfamkonatan artaĵon « La Adorado de la Dia Ŝafido », artpentraĵo de la fratoj Van Eyck kaj troviĝanta en la St Bavo-katedralo de Gento.

**Honorigo**

Antaŭ kelkaj tagoj en Bruselo oni elektis S-ron Roger Jaumotte kiel ĝeneralan sekretarion de la Belga Ligo de la Gazetaro.

Krome kun plezuro ni eksciis lian promocion kiel kapitanon en la belga armeo. Pro ambaŭ honorigoj al nia bona amiko Roger, al liaj edzino kaj filineto, al liaj gepatroj S-ro Maur. Jaumotte kun edzino, al lia bopatrino S-ino Meulemans, al liaj parencoj ni prezentas niajn plej sincerajn kaj korajn gratulojn ! ! !



**Gefianĉiĝo**

Antaŭ kelkaj semajnoj jam S-ro Paul De Roover fianĉiĝis al F-ino Raymunde Klein (lernantino de la nuna elementa kurso !). Tiun solenaĵon oni festis en intima rondo. Al la junaj gefiancoj, al la gepatroj S-ro H. De Roover (profesoro de la nuna kurso) kun edzino, al la gefratoj, al la parencoj ni ŝatas montri nian simpation per koraj gratuloj kun deziro de baldaŭa geedziĝo !

**Geedziĝo**

Kun plezuro ni eksciis pri la ĝoja novaĵo ke S-ro Florent Ameryckx, la pli juna filo de niaj karaj kaj fidelaj malnovaj gemembroj K. Ameryckx, edziĝis kun F-ino Marie-Jeanne Simons. Al la juna paro, al la simpatiaj gepatroj kaj al la parencoj (inter kiuj speciale Ges-roj J. Vinck kaj Ges-roj W. Van Nereaux) ni esprimas niajn korajn gratulojn kaj bondezirojn.

**BRUĜO**
**BRUĜA GRUPO ESPERANTISTA,**
**Reĝa Societo**
**Poŝtĉekkonto N° 4835.33**

La 18an de februaro, Sro. J. Eneman gvidis lernigan ludon laŭ televida maniero « Estas nur vorto ».

La 25an estis disaŭdigata la sonbendo kun verkaĵoj de tri mondfamaj Hungaraj esperantistoj : Julio Baghy, Dro. Kalomano Kaloczai kaj Dro. Bano Miklos.

Interparoligaj ekzercoj okazis la 3an de marto. La 10an de marto estis raportata pri la ĝenerala jarkunsido de BEF, Bruselo 7.3.64.

La kunvenoj de la 17a, 24a kaj 31a de marto, kiel tiu de la 7a de aprilo, estis okupataj per lernigaj ekzercoj.

La 14an de aprilo okazis eksterordinara kunveno en la hejmo de la vicprezidantino S-ino. S. Verbeke-Vanden Berghe, kiu faris interesegan paroladon pri « Naturŝtonoj » kun montrado de multaj ŝtonspecimenoj kaj artaj desegnaĵoj pri artkamenoj kaj kahelaroj. Detala vizito de la endoma ekspozicieĵo « Artkameno » (esperanta firmnomo !) finis la vesperon.

La 21an okazis konkurso pri eraraj desegnaĵoj.

Leciono de la elementa kurso okazis dum la unua horo de ĉiu ensideja kunveno.

**Programo por estontaj kunvenoj**

Kunveno ĉiumarde, je la 20a, en « Strijdershuis », Hallestraat, N° 14, Tel. N° 347.98. Dum la unua horo : leciono de elementa aŭ progresiga kurso, ankaŭ rekomendata al pli malnovaj gemembroj ; dum la dua horo :

MAJO 5an : Parolado kun kolordiapozitivoj de Sro. Jacobs, Prez. Brusela Grupo, pri « Vojaĝo al Andaluzio ». — 12an : « Tri tagoj en Parizo » parolado de F-ino. Y. Poupeye. — 16 - 17 - 18 : 46a Belga Esp. Kongreso en Liego-Wégimont. — 19an : Raportado pri tiu kongreso. — 26an : « Dudekdu stultaj tagoj » parolado de Sro. J. Eneman.

JUNIO 2-an : ĉe la Prez. : Elf Julistraat 11, Kanta vespero sub gvidado de S-ino. G. Poupeye. — 9an : Konkursludoj sub gvidado de Sro. D. Demeulenaere. — 16an : Parolata gazeto. — 23an : « Niaj familiaj nomoj » parolado de Sro. Ch. Poupeye. — 30an : Libertempaj proponoj.

**BRUSELA**
**REĜA ESPERANTISTA GRUPO**
**Kunsidoj : ĉiulunde en «Monico Nord»**

**2, Brabanto strato, Brusele-3.**

La 6an de Januaro, okazis la parolata ĵurnalo, la 13an F-ino Isaacson faris historian paroladon pri la Komunumo « St Josse » ; la 20an nia profesoro Sro van der Stempel, D. donis sian perfektigan kurson ; la 27an okazis la « Generala Jarkunsido » dum tiu kunsido oni reelektis la novan komitaton.

La 3an de Februaro okazis la ĉiumonata ĵurnalo parolata, Sro van der Stempel pritraktante la temon « Sajnkuraciloj » akiris la plej multe da poentoj ; la 10an ni festis nian ĉiujaron kolbasan kirmeson ; la 17an ni aŭskultis sonbendon, pruntedonitan de « Belhoro Blindaj Esperantistoj Grupo » el Budapesto ; la 24an Sro Schellekens faris interesan prelegon pri « Du Vizaĝoj el Grekujo ». La projektitaj diapozitivoj estis efektiva artaĵo. Koloroj pli belaj ol la naturaj mem. Sukcesplenan vesperon ni ĝuis dank' al Sro Schellekens.

La 2an de Marto okazis la parolata ĵurnalo. La laŭreatoj estis, en kategorio A : Sro Castel kiu prelegis spritan aferon titolitan « La Pipo », en la kategorio B : Sino Dewerchin per la teksto « Pri Internacia Tago de Diversaj Eksterlandanoj. La 9an Sro van Eynde venis tutspeciale de Antverpeno por paroladi pri « Ekonomiaj Problemoj ». Kutime tiuj problemoj konsistas nur el ciferoj ; sed, ĉi-foje, tutemale, ĉiu ĉe-estanto miris pro la manko de ciferoj kaj la diverseco de la traktitaj te-

moj. La paroladisto sinsekve parolis ege detale pri la Antverpena Haveno, la Stopilo de Ternaien, la ŝtalfarado, la diamant-industrio ktp.; la 16an nia perfektigkurso-profesoro van der Stempel nin instruis la refleksivajn verbojn kaj la posesivajn adjektivojn; la 23an ni akceptis en nia kluba rondo Sron Czuba el Varsovio, kiu tutimprovize paroladis, tre detale pri la evoluado de nia movado en Pollando. Li pritraktis diversajn aferojn kaj precipe la kontaktojn kun la superaj instancoj, la eldonado de libroj esperantaj, ŝtataj subvencioj, enkonduko de Esperanto en la lernejoj ktp.; la 30an ne okazis kunveno pro paska festo.

**Programo de Venontaj kunvenoj :**

MAJO la 3an : Parolata jurnalo. — la 10an : Parolado de Sro Castel. — la 25an : Parolado de Sro Vyncke «Uylenspiegel en Damme».

JUNIO la 1an : Parolata jurnalo. — 8an : Parolado fare de Sino Jacobs. — 15an : Perfektiga kurso fare de Sro van der Stempel. — 22an : Sino Staes. Parolado « La Brajla Skribo kaj Esperanto ».


**PETU PROSPEKTON PRI**




**ĈE I.T.C. - GEB. 114**
**SCHIPHOL NEDERLAND**


# Europo-festo 1964

**Komence de aprilo okazis en Antverpeno plurtaga, grandioza « Eŭropo-Festo » aranĝita de la « Flandra Movado por Popola Arto ».**

**La apoteozon en la urba Sportpalaco partoprenis pli ol mil gejunuloj de dek diversaj naciecoj, krom sesmil flandraj. Inter ili ni rimarkis plurajn esperantistojn, eĉ inter tuta aro ni renkontis unu esperantistan « Eŭropo-hostess ».**

**Popolaj dancoj en buntaj kostumoj kaj de plej diversaj naciecoj alternis kun imponaj kanthoroj kaj freŝaspektaj muzikistaroj. La kantojn de la amaso persone direktis majstroj E. Hullebroeck, A. Preud'homme kaj aliaj famaj flandraj komponistoj. La preparan laboran faris la konata flandra trobadoro W. De Meyer.**

**La amason alparolis W. Kunnen, ĝenerala prezidanto de la Movado por la Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo. Li substrekis, ke la Eŭropa Movado havas profundan respekton por la personaj ecoj de ĉiuj popoloj kaj sin bazas sur tiu pozitiva elemento por strebi al Federacia Nederlando en Federacia Eŭropo, survoje al Federacia, libera Mondo. La entuziasmo iĝis delira kiam majstroj Hullebroeck kaj Preud'homme kaj aliaj meritplenaj flandroj ricevis la signon de pro-honoraj senatanoj de la Eŭropo-Movado. Dume la staranta amaso ekkantis la majestan « Preĝon por la Patrujo » de la antaŭ nelonge formortinta komponisto, majstro Feremans.**


Por la « Eŭropo-Festo 1965 » invitis Bonn...

Kia vastega kampo priplugenda por Esperanto, se ni decidas elpaŝi nian verdan eburan turon !

E. C.



# KRUCVORTENIGMO N° 9



**DIFINOJ**

HORIZONTALE :

1) **Ili interesas vin.**
2) **Ujo — Konsilo de vendisto.**
3) **Person' kiu trompas.**
4) **Esprimo — Prefikso — Pronomo.**
5) **Anagramo de prepozicio — mallongilo de « Oficiala Gazeto » — Konjunkcio.**
6) **avenuoj — malsame**
7) **Angla antaŭnomo — infekte malsana.**
8) **Memamo — Frakci'.**
9) **Nomo de litero.**
10) **Karaktero de io facile uzebla.**

VERTIKALE :

1) **Unu el la cent.**
2) **Spec' de kuracisto.**
3) **Inklino por senrajte preni.**
4) **Malnova mezuro — Unuaj literoj de malofta metalo.**
5) **Konsentot'**
6) **Ruĝiĝas post morto.**
7) **Kiu forlasis iun movadon.**
8) **Komenciteroj de iu eksplodaĵo — pronomo — bedaŭreginde.**
9) **Poem' — Forta deziro.**
10) **Kiu festas siajn 25, 50 aŭ 100 jarojn.**

N.B. 1) La apostrofo (') post difino, aŭ post iu vorto de la difino, montras ke nur la radiko estas enskribota, do sen finaĵo.
2) La solvo aperos en la sekvonta numero, kun mencio de la solvintoj, inter kiuj libropremio estos ellotata.
3) Sendu NEPRE vian solvon al : Ch. Poupeye, Elf Julistraat, 11, Bruĝo, dum la 10 unuaj tagoj post la apero.

**SOLVO DE LA PROBLEMO N° 8**

| | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| G | E | A | M | A | N | T | O | J | - |
| E | T | N | A | - | E | O | L | O | - |
| R | I | G | I | D | A | - | E | D | Z |
| M | O | V | Z | O | N | O | - | O | - |
| A | L | I | O | - | D | A | R | F | I |
| N | O | S | - | F | E | Z | - | O | Z |
| I | G | O | R | - | R | E | T | R | O |
| S | I | - | E | - | T | - | O | M | L |
| M | O | D | E | R | A | - | N | - | A |
| O | - | A | N | E | L | I | D | O | J |

**Inter la diversaj ensendaĵoj, ok senereraj de : Sro. J. R. Van Eynde, Wilrijk ; S-ino. J. Plyson, Bruselo ; S-ino. J. De Hondt, Antverpeno ; F-ino. Elfrieda Ernst, Bruselo ; F-ino. Elvire De Coene, Ekeren ; Sro. J. Eneman, Assebroek ; F-ino. M. Willems kaj Sro. R. Iserentant, Bruĝo.**

**Lotumado, dum kunveno BGE 7.4.64, aljuĝis la libropremion al S-ino. Plyson.**

**Preseraro en la krado de tiu problemo igis ĝin malfacile solvebla. Ni sendis reĝustigan cirkuleron al ĉiuj de ni konataj solvintoj. Plia motivo por ensendi vian solvon kun plena adreso.**

# Korespondanoncoj

1) Se student(in)o volas korespondi kun lernant(in)o de Itala lernejo, li aŭ ŝi skribu al : Ministero Della Publica Istruzione Direzione Generale Scambi Culturali con l'Estero
Ispettorato Corrispondenza Scolastica
Via Napoleone 111,8
ROMA Italujo.
La studento devas indiki sekson, aĝon kaj la preferon por Esperanto.

2) Dudekjara junulo A. X. Dovbiŝ ; adreso : SOSTKA, Sumskoj obl. Korolenko 43-3, Ukrainio, U.S.S.R. (Ruslando)
deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtm., poŝtk. ilustr., alumetetiketojn, esperanto-gazetojn ktp.

3) Roman Mazurkiewicz Zielona Gora strato Bohaterow Westerplatt 9, Polujo deziras korespondi kaj interŝangi ekslibrisojn, diversajn landkoncernajojn.

4) Dekkvinjara lernantino Violeta Angelova, Ljulin 3, VRACA, Bulgarujo deziras korespondi pri ĉiuj temoj.

5) Deziras korespondi pri interŝanĝo de poŝtmarkoj :
KEFER Josefo, Gortina ŝt 11
poŝta Muta ob Dravi
Slovenio, Jugoslavio

6) Zaprianov Jeko,
Bul. Georgi Dimitrov
Bx B.An.38
Dimitrovgrad Bulgaria

7) Deziras korespondi kaj interŝanĝi P.M. :
Einrich Bense (Esperantisto ek de 1933)
Hauptstrasse, 3 Rotterode / Tür
Kreis Schmalkalden DDR

## KAJ PLIAJ . . .

70 geesperantistoj (10 - 60 jaraj) serĉas verajn kaj fidelajn geamikojn en la tuta mondo. Ili deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Bonvolu skribi amase ili atendas Viajn leterojn. Respondo garantiata. La anonco estas ĉiam aktuala.
Adreso : Stanislawa Majerczak, Kroscienko n/D. Sw. Kingi 71 - Pollando.

Tre deziras korespondi : FRANTISECH STRANIANEK, Mistecka ĉ. 499
PASKOV Ĉehoslovakujo Ĉ.S.S.R.

# LA MONDO NIN VOKAS

La Internaciaj Feriaj Kursoj en Helsingor, Danujo 19-26 julio '64.
Tiuj-ĉi jam fame konitaj kursoj okazos denove, pro la ĉiama sukceso. Matene okazas la lecionoj pri elementa, konversacia kaj perfektiga kursoj ; posttagmeze la ekskursoj al diversaj vidindajoj kiel la kastelo Kronborg (kie ludas Hamlet !) k.a.
Kostoj. plena pensiono : 3-4 pers. ĉambro : 210 D. Kr. ; 2 pers. ĉambro : 225 kaj 1 pers. ĉambro : 245 D. Kr. Infanoj pagas la duonon. Aliĝo devas okazi antaŭ 20 junio. Ĉiujn informojn donas la organizanto : L. Friis Ingemannsvej 9 Aabyhj Danujo.



Kongreso de la Kristana Esperantista Ligo Internacia.
Ĝi okazos en Lunteren, Nederlando de 25 julio ĝis la de Aŭg. En la centro de la lando, inter arbaroj kaj erikejo. Temo de la kongreso : "Paco de Dio, kaj surtera paco". Ankaŭ ekskursoj. Kotizo, kun plena pensiono : 121 Ned. Guld. Studentoj ĝuos favorajn kondiĉojn. Informoj ĉe :
F-ino Tini Putto Bennekomse weg 20 EDE (Gld.) Nederlando.

Instruisto Jean-Pierre BONNE en Sainte Geneviève des Bois (S. & Oise) Avenue Gai-Séjour, 39 Francujo, deziras verki en Franca lingvo du librojn. Li bezonas en resumo de kelkaj linioj naciajn rakontojn kaj propolajn legendojn. Ankaŭ li devas ricevi klarigon pri tutmondaj infanludoj. Li estos dankema pro helpo.

Du entreprenoj de la Pola Esperanto-Junularo
Adreso : ul. Dubois 3 WROCLAW
A) Pedagogia ekzperimento de "Urbo de la Juneco" en Afriko. Ili planas la starigon de junulara urbo en Etiopio, proksime de Addys, Abeba. Partoprenus junuloj de 11-19 jaroj, edukistoj kaj administra personaro. La unua kategorio konsistus nur el Afrikanoj. La celo estus eduki en malalt- kaj mezgrada instruo, en spirito de internacieco, tuthomara.
Detalojn vi povas ricevi ĉe supra adreso kaj ĉe la redakcio.
B) Kampanjo "Lazuro".
Tio similas al la konata "Grajnoj en Vento". Starigo de junulaj rondoj kiuj elektus kontinenton aŭ nur landon kaj provus kontakton kun simila junulara grupo el tiu lando aŭ urbo. Interŝanĝo de materialoj sciigoj, murgazetoj ktp.
Pliajn detalojn ĉe sama supra adreso.

Hispana Esperanto-Instituto kreis muzikan fakon. Tiu decidis eldoni la plej belajn kanzonojn klasikajn, folklorajn kaj modernajn. La unua disko estas jam preta, farita de firmao Vergara, mikrosulko 45 r/m. Ĝi enhavas repertuaron el Kataluna folkloro kaj "Gaudeamus Igitur" kantita de la "Schola Cantorum" de la Barcelona universitato. Venontaj diskoj enhavos kanzonojn premiitajn en la festivaloj de San Remo kaj de Barcelono.
Oni devas fari mendojn de minimume 5 diskoj.

Belaj grandformataj afiŝoj pri la specimenfoiro de Barcelono estas senpage haveblaj ĉe 32a Intern. Specimenfoiro Propaganda Fako Paso de Maria Christina, s/n Barcelono 4.
Adreso de la Hisp. Esp. Instituto : Str. Montcada 12 Poŝtkesto 1073 Barcelono 3.

P. V. B. A.
FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN
St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken
Vitraloj – Speguloj –
„securit" vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj
Vitro cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko
telefono 37.88.20

# Germana Esperanto Junularo

« La 7-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, okazinta en la kastelo Scĥaneck apud Munkeno de la 27-a de Decembro 1963 ĝis la 2-a de januaro 1964 kiun partoprenis pli ol 100 personoj el 17 landoj de Eŭropo, pritraktinte la ĉeftemon « Eŭropa kulturo — ĉu unueco en vario ? » en serio da prelegoj kaj diskutoj,

konkludas :

1) Formiĝintaj sur la fundamento de komuna kultura heredaĵo kaj inspiritaj de komunaj idealoj, la naciaj kulturoj de Eŭropo manifestas, unuflanke, aron da komunaj humanecaj trajtoj kaj, aliflanke, nombron da apartaj karakterizoj ŝuldataj al la respektivaj naciaj kaj regionaj influoj, kiuj, se ili ne degeneris en la ekskluzivecon de nacia ŝovinismo, ne forprenis de la eŭropa kulturo ĝian humanisman karakteron.
2) Same kiel la utiligo de naciaj lingvoj en tiuj branĉoj, kiuj uzas la lingvon kiel instrumenton de kultura kreado, ne nur ne kaŭzis monotonecon de la enhavo, sed, male, kondiĉis la liberan esprimiĝon de regionaj koloroj kaj individuecaj konceptoj, tiel same la uzado de la internacia lingvo kiel rimedo de arta kreado signifas nek forigon de naciaj aŭ regionaj karakterizoj, nek detruon de naciaj kulturoj, sed plifortigon de humanismaj trajtoj kaj larĝigon de la sfero, en kiuj ĉiuj individuecaj elementoj povas pli efike manifestiĝi. »



**— Mi havas tute alian opinion pri la balo de la Esperanto-grupo.**


G. FAES

Eiermarkt, 21
ANTVERPENO

★ Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

LES ENTREPRISES
DERKS
226, Rogierstrato, BRUSELO 3
Tel. : 16.89.92

Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

# manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54

## VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ
## " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj

### PRECIPAJ CENTROJ:

| | | |
|---|---|---|
| Antwerpen | : | Aalmoezenierstr. 2 |
| | | Abdijstr. 57 |
| | | Anselmostr. 17 |
| | | Nationalestr. 87 |
| Arlon | : | Marché-aux-Légumes 16 |
| Brugge | : | Breidelstr. 8 |
| Brussel | : | Galerie d'Ixelles 9 |
| | | Anspachlaan 194 |
| Eupen | : | Kirchstr. 14 |
| Gent | : | Brabantdam 25 |
| Herstal | : | Rue Large Voie 4 |
| Leuven | : | Bondgenotenlaan 29 |
| Luxembourg | : | Place de la Gare 67 |
| Mechelen | : | Grootbrug 8 |
| Roeselare | : | Ooststr. 124 |
| Tournai | : | Rue Royale 75 |
| Turnhout | : | Herentalsstr. 6 |
| Verviers | : | Pont St. Laurent 2 |


— Presita en Belgujo de H. De Baene-Sercu, Delaplacestraat 9, Sint Kruis Brugge —